ESPERANTO
★ TRIUMFONTA ★

N-o 35, 5. Junio 1921. | Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de **Teo Jung, Köln-Horrem** (Germ.) | ★ Eliras semajne. ★

XIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Praha.

(31. Julio — 6. Aŭgusto 1921.)

IX-a Komuniko.

(Vidu ankaŭ la antaŭan numeron!)

Novaj Aligoj. — (La nomo de la urbo ĉe la kune aligintoj trovigas ĉiam ĉe la tasta!) — 381. s-o Parizek-Uzok (anstataŭ s-o Sappl—128), 406. s-ino Oulehlova-Skrivany, 407. s-o Hes, 408. s-o Interholzinger-Plzen, 409. s-o Dolansky-Nyrany, 410. s-o Tichota-Dolany, 411. s-o Bouček, 412. s-o Jar. Demut, 413, s-o Jos. Demut, 414. s-o Hovorka, 415. s-o Blaha. 416. f-ino Würflova, 417. f-ino Hladka, 418. f-ino Honzova-Plzen, 419. s-o Zika-Klabava, 420 kaj 421. ges-oj Cerny, 422. f-ino Holubova, 423. f-ino Melkova-Plzen, 424. s-o Svetolik-Pirot, 425 kaj 426. ges-oj Sembera-Brno, 427. s-o Kaplan-Bialystok, 428. s-o Koc, 429. f-ino Tyserova-Plzen, 430. s-o Heinze-Oberlössnitz, 431. s-o Löffler-Radebeul, 432. s-o Schlag-Kötschenbroda, 433. s-o Barthelmess-Düsseldorf, 434. s-o Rado-Lučenec, 435. s-o Hönigsberger-Nürnberg, 436. s-o Gili-Sarria, 437. d-ro L. Zamenhof-Warszawa, 438. s-o Svingr, 439. s-o Vyhnal-Cehnice, 440. f-ino Hajkova-H. Briza, 441. s-o Eiselt-Vinohrady, 442. s-o Riedl-Nova Paka, 443. f-ino Tomkova-Jilemnice, 444. s-o Cerveny-Starkoč, 445. s-ino Raichlova-Dobre, 446. f-ino Lieblova-Plzen, 447. s-o Kratochviela-Seredi, 448. s-o Knopf-Beuthen, 449. s-o Bredall-Croydon;

450. s-o Dufrenne, 451 kaj 452. ges-oj Donker-Amsterdam, 453. s-o Gaševski, 454. s-o Fandekov-Sofia, 455. s-o Stojan Terzew-Grancar, 456. s-o Schmidt-Nove Zamky, 457. s-o Kozirev-Moskva, 458. s-o Forejt, 459. f-ino M. Laiblova, 460. f-ino R. Laiblova-Doubravka, 461. s-o Glöckner-Freiberg, 462. f-ino Sloun-San Francisco, 463. s-o Kurjanski-Bialystok, 464. s-o Hronek-Slany, 465. s-o Sperling-Niedersedlitz, 466. s-o G. Mahn, 467. s-o A. Mahn, 468. s-o Pohl, 469. s-o Schwaiger-Berlin, 470. s-o Küssner-Delitzsch, 471. s-o Walther-Magdeburg, 472. s-o Mawbey-Johannesburg, 473. f-ino Macfarlane-Partik Glasgow, 474. s-o Wüster-Berlin, 475. s-o Gunia, 476. s-o Zajic-Privoz, 477. f-ino Holec, 478. s-o Benisch-M Ostrava, 479. s-ino Baroch-S. Ostrava, 480. s-o Janik-Vitkovice, 481. s-o David-Liberec, 482 kaj 483. ges-oj Stratil-Bratislava, 484. s-o Braschke-Breslau, 485. s-o Phee-Glasgow, 486. f-ino Smulders-Vught, 487 kaj 488. ges-oj Brantjes-Hertogenbosch, 489. s-o Santamaria, 490 kaj 491. ges-oj Acha-Bilbao, 492. s-o Solta-Berunice, 493. s-o Dubny-Orlova, 494. s-o Vesely-Vichova, 495. s-o Papica-Mezice, 496. s-o Urban-Litovel, 497. s-o Kolaček, 498. s-o Maly-Jilemnice, 499. s-o Pfennigwerth-Hirschfelde;

500. f-ino Supichova. 501. f-ino Moudra, 502. f-ino Dlouha, 503. s-o Dejmek, 504—506. familio Novak, 507. d-ro Kohout-Praha, 508. s-o Bernhard-München, 509. s-o Boschan-Praha, 510. f-ino Lonštakova, 511. f-ino Dočkalova-Prostejov, 512. s-o Rippl-Hardes, 513. f-ino Jiroutova-Moravany, 514. s-o Drechsler-Dresden, 515. d-ro Steche-Leipzig, 516. s-o Rösch-Radebeul, 517. s-o Schamanek-Wien, 518. f-ino Koekebakker, 519. f-ino Groenendijk-Amsterdam, 520. s-o Halbedl-Graz, 521. f-ino Bostrŏm, 522. s-o Skog-Gävle, 523. s-o Brablec, 524. f-ino Brablecova-Kunstat, 525 kaj 526. ges-oj Ravenstein-Hago, 527. s-o Despeyroux-S. Cenis Laval, 528. f-ino Vilario-Barcelona, 529. s-ino Umanski-Genève, 530. s-o Yppen-Düsseldorf, 531. Pilc-Czenstochova, 532. s-o Rippel-Würzburg, 533. s-o Mader, 534. s-o Bartel, 535. f-ino Thumpach, 536. s-o Wallner-Graz, 537. s-o Wenig-Mecholupy, 538. s-o Mergel-Warszawa, 539. s-o Pech, 540. s-o Kleich-Zittau, 541 kaj 542. ges-oj Kratochvil-Smichov, 543. f-ino Prihoda-Dvur K., 544. s-o Bock, 545. f-ino Bock, 546. s-o Meznik, 547. f-ino Meznik, 548 kaj 549. ges-oj Huppert, 550 kaj 551. ges-oj Frankel, 552. s-o Synek, 553. s-o Bienenstock, 554. s-o Teichmann, 555. s-o Gogolka-Bielitz;

556. s-ino Janečkova-Vitkovice, 557. f-ino Becker, 558. f-ino Kreffl-Breslau, 559. s-o Mangada-Jaca, 560. s-ino Cermakova-Usti n. Orl., 562 kaj 563. ges-oj Strelec-Biskovice, 564. f-ino Klusalova-Fryštak, 565. f-ino Fojtova-Bystrice p. H., 566—569. familio Kubasek-Plzen, 570. d-ro Drtina-Beroun, 571. s-o Kroutl-C. Budejovice, 572. s-o Tokar-Vitkovice, 573 kaj 574. ges-oj Privat-Genève, 575. s-o Carles-Beziers, 576. s-o Prats-Tarrasa, 577. f-ino Wagemaker-Rotterdam, 578. s-o Haba-Vizovice, 579 kaj 580. ges-oj Balak-Husovice, 581. s-o Grohmann-Georgswalde, 582. s-o Kirchhübel-Ebersbach, 583. s-o Göhl-Neugersdorf, 584 kaj 585. ges-oj Aron-Königsberg, 586. d-ro Blassberg-Krakow, 587 kaj 588. ges-oj Mraz-Trenčin, 589 kaj 590. f-ino M. E. Kopecka, 591. s-o Strnad, 592. s-o Tuček, 593. f-ino Vlčkova, 594. s-o Voseky, 595. f-o Weigeltova, 596. s-o Dobeš, 597 kaj 598. ges-oj Janda, 599. s-o Fabera, 600 kaj 601. ges-oj Hromada-Praha;

602. s-o Schumm-Schweinfurt, 603. s-o Jungfer-Lübben, 604. s-o Alings-Amersfort, 605. f-ino Kennedy, 606. s-o Kennedy-Glasgow, 607. f-ino Hrbačkova-Zlin. 608. d-ro Dietterle-Leipzig, 609. s-o Panler, 610. s-ino Markus, 611. s-o Zwach, 612 kaj 613. ges-oj Steinhauer, 614. s-o Sinek, 615. s-ino Mala, 616. s-o Zoubek, 617. s-o Deistler, 618. s-o Siedl, 619. s-o Schicketanz, 620. f-ino Schicketanz, 621 kaj 622. ges-oj Krieger, 623. s-o Bischof, 624. s-o Berman, 625. s-o Jokl, 626 kaj 627. ges-oj Süssmann-Wien, 628 kaj 629. f-inoj B. R. Schwarzova-Smichov, 630. f-ino Lukešova-Buheneč, 631. s-o Kok-Rotterdam, 632. s-o Hartman, 633. s-o Langer, 634. Stankiewicz-Warszawa, 635. s-o Clavenna, 636. s-o Redolfi, 637. f-ino Tegoni, 638 kaj 639. s-ino kaj f-ino Imperiale-Sampierdarena, 640. s-o Jiresch-Neu-Sedniţ, 641. s-o Pöcke, 642. s-o Lehnert, 643. s-o Lorenz, 644. s-o Walter, 645. s-o Richter, 646. s-o Seidl, 647. s-o Müller, 648. s-o Storch, 649. s-o F. Storch, 650. f-ino Lustineţ, 651. f-ino Fiedler, 652. f-ino Ahne-Krochwiţ;

653. s-o Vosahlo, 654. s-o Ludvik, 655. f-ino Mersičova, 656. s-ino Pemlova-Prelouč, 657. s-o Mašek-Stupno, 658. f-ino Marelova-Slavonov, 659. s-o Matonš-C. Budejovice, 660. s-o Aišman-Plzen, 661. f-ino Vesela-Josefov, 662. s-o Kohn-Plzen, 663. s-o Paša, 664. f-ino Mičkova-Hrušov, 665. s-o Bohutinsky, 666. f-ino Mračkova, 667. f-ino Plzenska, 668. f-ino Heppnerova, 669. s-o Vondruška, 670. s-o Šilha, 671. f-ino Kubikova, 672. f-ino Vojtova, 673. f-ino Storchova, 674. s-ino Kostinkova, 675. f-ino Fialova, 676. f-ino Vycpalkova, 677. f-ino Hlavačova, 978. f-ino Nesmerakova, 679. s-o Vrany, 680. f-ino Balkova, 681. s-ino Panyrova-Praha, 682 kaj 683. f-inoj B. Š. Chroustova-Tuklaty, 684. f-ino Součkova-Praha, 685. s-o Podloučka, 686. f-ino Hübner-Brno, 687. d-ro Fischer-Weidenau, 688. f-ino Hlavačkova-Kladruby, 689 kaj 690. ges-oj Rozanykwiat, 691. s-ino Fidelseid-Warszawa, 692. d-ro Samu, 693 kaj 694. ges-oj Herz-Budapest, 695 kaj 696. ges-oj Turzo-Szeged, 697. s-o Roboz-Budapest, 698. s-o Sorensen-Skjelskor, 699. s-o Hloun-Nem. Brod, 700. f-ino Alschwang-Lausanne;

701. s-o Cros-Perpignan, 702. s-o Guenoff, 703. s-o Kolev-Sofia, 704. f-ino Marcus-Lodz, 705. s-o Grada, 706. Delegito laborista-Genova, 707. s-o Gueritte-Surbiton, 708 kaj 709. ges-oj Krejl, 710. f-ino Jörgensen, 711. s-o Alsing, 712. f-ino Rybo, 713. f-ino Asmussen, 714. s-o Taumose-Kobenhavn, 715 kaj 716. ges-oj Medem-Kovno, 717. s-o Havrda-Dobrichovice, 718. s-o Sklenčka-filo-Hradec K., 719. s-o Michalek-Liberec, 720 kaj 721. s-ino kaj filo Fadinkov-Sofia, 722. f-ino Meţ, 723. s-o Halasz-Targul Mureš, 724. s-o Cesarini, 725. f-ino Cesarini-Potenza, 726. s-o Simeonov-Sofia, 727. s-o Hebky, 728 kaj 729. ges-oj Poustka, 730. s-o Wisinger, 731. s-o Šuster, 732. f-ino Hodikova, 733. s-o Cavallar, 734. s-o Waldstein, 735. f-ino Waldsteinova, 736 kaj 737. ges-oj Ivanovič-Švarz-Praha.

Post la 20. majo estos al ĉiuj aligintoj, esp. asocioj kaj al ĉiu, kiu ilin deziros, sendataj oficialaj aligiloj!

Adreso. — Aug. Pitlik, Praha III, Nerudova 40. — Oni respondos nur, se estos aldonitaj respondkupono aŭ afranko en neuzitaj, naciaj poŝtmarkoj!

Por la Loka Kongresa Komitato:
Augustin Pitlik, ĝenerala sekretario.

Esperantismo Triumfanta.

Ĉiuj esp. gazetoj ofte raportas pri diversaj triumfoj de Esperanto, t. e. pri akcepto de nia lingvo en tiea aŭ ĉitiea societo: sed pri esperantismo malmulte. Mi kuragas do iom paroli pri reala fakto de interna ideo de Esperanto; ĝi estas vera kaj bela triumfo de esperantismo.

Ĉiuj homamaj esperantistoj legis kun ĉagreno en la koro la suferadojn de l' aŭstria popolo post la finigo de la milito. La Esp. Societo por Stirio en Graz (Aŭstrio) sendis al la esperantistaro dum januaro de 1920 kortušan alvokon por helpi la aŭstriajn infanojn, senkulpajn viktimojn de l' malbonajoj de la homoj. Ni hispanaj esperantistoj, ricevinte la humanan alvokon de niaj fratoj el Graz, tuj disvastigis la malĝojigan novaĵon kaj konatigis ĝin al bonkoruloj, certaj pri la ĝojiga sukceso de nia inda entrepreno.

En Zaragoza, Valencia, Gerona, Vich, Manlleu, Sabadell, Barcelona, Tarrasa, Cheste, Burriana, Gigon, Teruel kaj aliaj urboj grandaj kaj negrandaj oni starigis komitatojn por helpo al la aŭstriaj infanoj. Kaj mirinde nia afero estis helpata de niaj samlandanoj. Ĉie, kie trovigas esp. grupo aŭ eĉ nur izola esperantisto, oni akceptis gastame aŭstriajn infanojn, kai nun dank' al esperantismo pli ol 300 sin savis kaj ĝuas fratan amon inter la gastema hispana popolo. Jes, laŭte kaj fiere ni devas krii kaj ĉien sciigi, por ke oni perfide ne konfuzu, ke ĝis nun en Hispanujo la gastigo de aŭstriaj infanoj estas nete esperantista entrepreno! Ni hispanaj esperantistoj estas fratoj de vi, aŭstriaj: Jam la obstinai baroi dissaltis inter la esperantistoj, ni estas civitanoj de la mondo!

Ne sentu nostalgion al viaj filoj! Ni ŝentas bone en niaj koroj la humanan idealon de nia Majstro. Ĉiujn viajn knabojn ni amas. Karece al ili ni donas nian panon ĉiutagan. Ni ne estas nur simplaj lingvanoj, ni ne estas el tiuj esperantistoj, kies celo estas nur personaj ambicioj pere de nia lingvo aŭ el tiuj, kiuj prenas Esperanton kvazaŭ simplan amuzilon. Ni estas civitanoj de Esperantujo. Veraj samideanoj devas ĉiam batali por paco kaj amo. Tiel ni agas, kun amo ni akceptis la suferantajn infanojn, kaj por paco ni batalas ĉie kaj ĉiam.

Estas jam eterna kutimo, ke fremdulo, vizitante nian landon, se li estas jurnalisto, en siaj kronikoj ofte raportas pri barbara spektaklo: Batalo inter taŭro kaj homo, kaj ĝin pentras kiel bildon de Hispanujo. Grava eraro! Ne ĉio en Hispanujo estas barbara amuzo. Ĉiuj popoloj havas ion ajn malbonan. Oni kritiku malbonajojn, sed oni laŭdu ankaŭ ĉion, kio estas bela kaj nobla. Tial de nun estas bona okazo por pentri bildeton de Hispanujo, kia ni ĝin rajtas pentri; ĉar, kvankam la entrepreno estas nete esperantista, ni estis helpataj kaj ni sukcesis dank' al la gastemo de nia popolo.

En la Libron de Esperantismo oni devas enskribi per oraj literoj la nomojn de la entreprenintoj kaj gastigantoj, precipe tiujn de s-o Karl Bartel el Graz kai s-o Emilio Gaston el Zaragoza, al kies laboroj oni šuldas la tutan sukceson de la afero. Vigle kaj brave laboris por la sukceso de nia afero ankaŭ la lokaj komitatanoj, precipe tiuj el Cheste, Tarrasa kaj Gerona, simile agis ankaŭ tiuj el la ceteraj nomitaj urboj.

Kiel ateston pri la bonstato de la infanoj mi diras, ke ili kreskis dum ses monatoj pli ol 10 centimetrojn kaj ilia pezo plimultiĝis per 10—14 kilogramoj depost ilia alventago. Ili sin sentas feliĉaj kaj kontentaj ĉe ni. Dankemajn leterojn ni ofte ricevas de la gepatroj. Ĉie la infanoj estas afable akceptataj de la loĝantaro.

Esp. Societo por Stirio estas ja imitinda. Ĝi pruvis, kiom Esperanto povas atingi. „Kie estas esperantistoj?“ ĝi demandis, kaj en nia lando, pri kiu oni tiel ofte malĝuste skribas, la grazaj esperantistoj, niaj karaj fratoj, trovis belan respondon.

Ni estas esperantistoj, homoj ni estas. Esperanto bonigas niajn korojn kaj emigas nin kompati unu la alian. La triumfo estas nia. Esperanto enradikigis en ni ideojn de amo, bela frukto de nia idealo jen estas raportata.

Aŭstriaj gefratoj, ni ree diras al vi: Ne sentu nostalgion al viaj ĉarmaj infanoj! Malavare ni ilin akceptis, gastame. Viaj filoj estas ankaŭ niaj, kaj ĝis la reveno al sia patrolando ili ĝuos sian junecon sub la blua ĉielo de nia varma kaj bela lando, kaj amo kaj pano ne mankos al ili. Jam estas Esperantismo triumfanta.

Seb. Chalen, Tarrasa.

La Kongreso de Essen.

(Fino.)

Post la tagmanĝo en diversaj restoracioj aŭ ĉe gastemaj Essen'anoj oni kunvenis je la 4-a por la unua laborkunsido. Raporti pri la enhavo de la laborkunsidoj postulus tro multe da spaco*). Sufiĉas mencio, ke d-ro Steche bonkonscie povis diri, ke li — kaj kiel malnova parlamentano li estas sperta en tiu rilato — malofte partoprenis diskutadojn, kiuj estis tiom seriozaj kaj altgradaj. Danke la germanoj konfesas, ke ĉi tiun laŭdon ili meritas pro la sperta gvidado de d-ro Steche.

Festa vespero! Kiom ni aŭdis! Domaĝe ke anstataŭ kelkcentoj ne kelkmiloj da esperantistoj povis partopreni la eksterordinaran ĝuon! Komencis per prologo kaj finis la vesperon per deklamaĵo f-ino Goedeke. Se mi laŭ ŝia merito laŭdus ŝin, vi leganto j pensus: Aha! ankaŭ li . . . ! Mi nur volas mencii ŝian vere bonegan elparoladon! La sama laŭdo apartenas al la „adiaŭaj vortoj de Ifigenio“ kaj al „Paco“ de Heine, kiujn deklamis samideanino per tio montranta sin inda je la famo de sia iama instruanto kaj nuna edzo s-ro Pillath. Kvarobla virkvarteto kantis la himnon kaj aliajn kantojn en germana kaj esperanta lingvoj. Tondra aplaŭdo montris al la kantintoj la dankemon de la kongresanoj. F-ino Fritsch de la Essen'a teatro prezentis germanajn kantojn en Esperanto. Eĉ se mi ne estus esperantisto, mi preferus la belsonon de Esperanto kantata al tiu de itala lingvo. S-o Mollenhauer prezentis sin kiel lerta esperantisto en dialogo kun f-ino Goedeke. La porcelan-fabriko en Meißen sendis en granda kesto pupon, kiu parolis Esperante, sed ne nur „Mama“. Ĉar ŝi estis jam sufiĉe granda, ŝi eĉ povis rakonti pri aventuro (antaŭ- aŭ dumkongresa?), kiu necesigis gravan riparon.

Mi fakte ne troigas, se mi konfesas, ke la vespero donis tiom da alta ĝuo, ke ĝi restos neforgesebla al ĉiuj.

Nun venis unu el la ĉe Esperanto-kongresoj kutimaj postkunsidoj, pri kiuj oni parolas dum postaj kongresoj ankoraŭ multajn jarojn. Kvindeko da gesamideanoj kuniĝis en antaŭurba malgranda restoracio. Nia neniam laca s-ano Hurler instigis ilin tiel forte je danco, kantoj, deklamoj, rakonto de humorajoj kaj ankaŭ mem ĉiam havis ion preta, ke preskaŭ senpaŭzaj prezentadoj amuzigis dum kelkaj horoj la sidademulojn. Preskaŭ ĉiuj restis ĝis la fino, kaj hejmen marŝante ili prave povis kanti: „Tagiĝo, tagiĝo radias en rond' . . .“

Sed, ĉu vi pensas, ke ili laciĝis? Ho, ne! Frumatene ili jam venis por partopreni la diservon kaj aŭdi la predikon de nia fama s-ano Metzger el Graz. Kaj la dua laborkunsido (lundon matene je la 10-a) estis ankoraŭ pli bone vizitata ol la unua.

Posttagmeze oni ekskursis parte per specialaj tramvoj-vagonaroj parte piede en la ĉarman Ruhr-valon ĝis Werden. La ĉambrego en la „Grottenburg“ preskaŭ ne povis akcepti ĉiujn gesamideanojn kaj gastojn. Baldaŭ oni komencis danci kaj komune kanti alterne kun humoraj deklamoj en ĉiaj germanaj dialektoj. Seninterrompe unu prezentado sekvis alian. Kaj tiel bonege oni amuziĝis, ke la lastaj gastoj ne plu atingis la noktmezan vagonaron sed piede devis reiri la duhoran vojon al Essen. Vi ĉarmaj Essen'aninoj!

*) Supoze ni raportos en venonta numero pri la laborkunsidoj.

Per kiom via konscio estas ŝarĝita en tiu ĉi bela nokto, dum kantis la najtingaloj! Ĉu vi aŭdis ilin? Aŭ ĉu pli belaj sonoj atingis viajn orelojn?

Ankaŭ en ĉi tiu nokto — oni diris al mi — la lastaj forlasis la neoficialan kongresejon en Moritzstrato nur post la 5-a matene. Tamen oni ne rimarkis laciĝon en la lasta laborkunsido mardon matene. La sama fervoro kiel en la unua kunsido donis animon al ĉiuj la interesaj kaj gravaj diskutoj. Estis vera esperantistoj, kiuj kunvenis en Essen.

Iom post iom la gesamideanoj forlasis Essen. Tamen sufiĉe impona aro partoprenis posttagmeze ekskurson al Krupp kaj povis admiri la imponan grandecon de la mondkonata fabriko kaj la socialajn instituciojn, kiuj fakte estas modelaj.

Adiaŭa kunveno en „Städt. Saalbau“ estis la fin-takto de la kongreso. Kvankam la humoro pretendis sian rajton, oni tamen rimarkis sur ĉiuj vizaĝoj la doloron pri la fino de la gravaj tagoj, kiuj dank' al senlacaj penoj de la gastigantoj malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj kaj malhelpoj estis plena sukceso.

Unu post la alia oni forvojaĝis kun la certa intenco ne foresti de l' venonta kongreso en Breslaŭ. Per la merkredaj vagonaroj forveturis la lastaj. Kun mi veturis iu ĉarma sinjorino, kiu vane klopodis en la vagono retrovi la nehavitan noktripozon. Tion ne allasis la pensoj pri la belaj tagoj.

X. Y.

Al la vizitantoj de la XIII-a,
transveturontaj Berlinon

la Berlina Esperantistaro adresas la koran inviton restadi unu aŭ du tagojn en Berlino, por ebligi la aranĝon de

Internacia Manifestado por Esperanto

en la ĉefurbo de germana respubliko.

La manifestado konsistu el akcept-vespero en la urbdoma salonego, al kiu estas invitataj la regist- kaj urbestraro kaj la gvidantoj de la politika, scienca, arta, komerca kaj industria rondoj.

Samideanoj el plej eble multaj landoj dokumentu dum ĉi tiu manifestado per mallongaj paroladoj la jaman tutmondan disvastecon de nia movado. Ni petas ĉiujn, kiuj afable sekvos nian inviton, sciigi plejeble baldaŭ (plej malfrue ĝis la 10-a de julio) tagon kaj horon de sia alveno. Ni zorgos pri akcepto ĉe la stacidomo, loĝado kaj aranĝos diversajn gvidojn tra la vidindaĵoj de la urbo kaj ĉirkaŭaĵo.

La internacia manifestado okazos la 27-an de julio vespere, por ke la vizitantoj de la antaŭkongreso en Dresdeno povu esti tie la 28-an tagmeze. Por la nevizitantoj de la antaŭkongreso ni aranĝos komunan vojaĝon al Praha.

Ĉiujn rilatajn korespondaĵojn oni adresu al s-o Georg Mahn, Berlin-Wannsee, Tristanstr. 5.

Kun samideana saluto

Esperanto Gruparo Berlin.
Ludwig Schiff,
prezidanto.

Postkongresa ekskurso al Bratislava.

La esperantistoj de Bratislava (Pressburg, Pozsony) invitas plej sincere la partoprenantojn de la XIII-a kongreso, viziti post ĝi ilian urbon, kiu estas ne sole rimarkinda pro multaj arhitekturaj belaĵoj, pitoreska ĉirkaŭaĵo, grava industriaj entreprenoj kaj rapide disvolviĝanta komerca haveno en la Danubo, sed kie la granda signifo de la urbo, kiel grava komerca centro, estos dokumentata dum 6.—16. aŭgusto per grandioza „Orienta Foiro“, kiu unuan fojon montros en la sistema aranĝo la produktaron, kiun centra Eŭropo ofertas al la proksima oriento, kaj kion tiu ĉi ofertas al ni.

La Orienta Foiro korespondas en Esperanto, kaj dejoras en ĝi ĉiutage esperante parolanta oficisto.

La subskribita societo aranĝos komunan karavanon de la kongresanoj, kiu foriros el Praha la 6. aŭgusto vespere, atingos Bratislava'n matene, estos zorge akceptata, kaj ni ĉiuj klopodos, ke ĝiaj partoprenantoj forportu el nia urbo la plej belan impreson.

Ni zorge plenumos ĉiujn petoin koncerne loĝadon, kaj ni esperas, ke almenaŭ ĉiuj partoprenantoj de la postkongreso en Budapest vizitos nin.

Esperanto-Tablo-Girlando, Posonium.

J. Klapita D-o St. Kamaryt E. Wanitsek
Sekretario. U. E. A. delegito. Prezidanto.

Ĉiujn informojn donas E. Wanitsek, Bratislava, radnice.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Esp. Paro en Mortdangero.

Je helvetera dimanĉmateno pentekosta li veturis kun sia fianĉino per bicikloj al urbo Alkmaar (Nederlando). Kiam ili alvenis ĉe la transireja pontono de Knollendam (antaŭvilaĝeto de Wormerveer), malgranda motorŝipo preterpasis. La pontonisto mallevis la ŝtalan draton. Post la malgranda alvenis granda salonboato, du- aŭ triferdekulo. La drato ne kuŝis sur la fundo de la kanalo. La postkilo de la vaporŝipo ekkaptis la draton kaj fortrenis ĝin; la drato elvolviĝis el la streĉaparato sur la bordo rapidege ĝis la fino, kaj poste la tuta aparato diskreviĝis. Pecoj de la radoj disflugis ĉien: unu peco tra tegmento, alia preter oranĝovendistino falis kontraŭ iu biciklo, kies skeleto tute rompiĝis. Aliaĵn pecojn oni trovis trans la centmetra kanalo. Tre anksia kaj terurigita nia esperantista paro daŭrigis sian biciklan ekskurson, kiu preskaŭ estus fininta por ili fatale.

La Esperanto-movado en Plauen (Germ.). Raporto de la Esperanto-Lernejo.

Jam 14 jarojn estas la Esperanto-movado en Plaŭen. Precipe dum lastaj du jaroj la sukcesoj estas rimarkindaj. Okazis

1919/20:	5	kursoj	por	plenkreskuloj,	92 p.
1920/21:	8	„	„	„	172 p.
nuntempe:	7	„	„	„	175 p.
1919/20:	5	„	„	infanoj	210 p.
1920/21:	10	„	„	„	250 p.
nuntempe:	9	„	„	„	240 p.

Partoprenis do la Esperantan instruadon de la Esp.-Lernejo, kiu estas submetita al la Saksa „Wirtschafts“-ministerio, 444 plenkreskuloj kaj 706 infanoj = 1150 personoj. Krom tio en la Metia Lernejo estas kurso por junuloj. En Plaŭen estas 2 grupoj por plenkreskuloj kaj 2 grupoj por gejunuloj. 60 personoj estis ekzamenataj dum la lasta jaro, kiuj bone, eĉ tre bone sukcesis. Bedaŭrinde la Esp.-Lernejo ĝis nun ne ricevas iun subtenadon; tial oferemaj amikoj de la esp. movado estas petataj, sendi mondonacojn, ĝis la urbo aŭ ŝtato subtenos la instruadon.

Guido Otto, direktanto,
Plauen i. V., Germanujo, Goethestr. 105.

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 8-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro

Maria Šidlóvskaja.

(24-a daŭrigo.)

XIV.

Mateo longe kuŝis en mallumo kun malfermitaj okuloj kaj ekdormetis nur antaŭ tagiĝo, kiam dum mallonga tempo tute silentiĝis la stratoj de la urbego. Sed malkvieta kaj turmenta estis lia dormo: kutiminte respekti sin mem, li ne povis forgesi, kion faris al li la sentaŭgulo Paddy. Endormiĝante, li komencis songi, ke li staras, nekapabla movi piedon nek manon, kaj lin aliras iu riverencante, fleksante la genuojn kaj tordante la korpon kiel serpento, — aŭ Paddy, aŭ iu krisphara negro, aŭ eble John. Li ne povas kontraŭstari kaj falas ien meze de bruado kaj kriado, kaj antaŭ liaj okuloj preterglitas la timigita vizaĝo de Anna.

Poste subite ĉio malaperis, kaj li songas pri hebrea edziĝa festo: Mr. Mozes el Louisville, hebreo kun malagrabla fizionomo, geedzigas la junan John kun Anna. John, plenumante hebrean kutimon, triumfe piedpremas glaseton, kaj ĉirkaŭe staras irlandanoj, ĉiuj ŝvitantaj, large malfermas la okulojn, akre fajfigas fluton kaj dikventran kontrabason, ĝemigas violonon . . . Flanke staras Berko, meditema kaj mirigita, kaj diras:

„Nu, kion vi diros? Kiel vi povas tion permesi?“

Mateo senkonscie grincigis la dentojn, tiel ke Dima vekiĝis kaj time forŝoviĝis de li.

„He, he!“ kriis Mateo ne vekiĝante: „Kie do estas ĉi tie la kristanoj? Ĉu vi ne vidas, ke hebreoj kaptis la kristanan ŝafideton?“

Dima forŝoviĝis ankoraŭ pli, aŭskultante la ne bone kompreneblan balbutadon de Mateo, sed Mateo nenion diris plu . . . Alkuras kristanoj el ĉiuj flankoj, el stratoj kaj bazaroj, el drinkejoj kaj butikoj! Alkuras kristanoj kun bruo kaj krio, kun ŝtonoj kaj hakiloj . . . Rapide fermiĝas la pordoj de l'-domoj, de l' butikoj, tintas vitro, aŭdiĝas plenaj je malespero ĝemkrioj de virinoj kaj infanoj, flugas el fenestroj la tuta mizera hebrea proprajaĉo, plumoj el kusenegoj kiel nego kovras la stratojn . . .

Poste ĉio silentiĝis, kaj al songanta Mateo iu alproksimiĝas kaj diras per voĉo grava, impona, ion tian, pro kio la vizaĝo de Mateo eĉ en songo aperigas miregon kaj konfuziĝon . . .

Li vekiĝis. La irlandanoj rapide trinkis sian kafon en la apuda ĉambro kaj estis forirontaj. Dima evitis rigardi Mateon, sed Mateo ĉiam pendadis ekmemori, kion „iu“ parolis al li en songo; li frotadis al si la frunton, sed ne memoris eĉ unu vorton. Poste, kiam ĉiuj disiĝis, kaj la ĉambro malpleniĝis, Mateo iris per la ŝtupareto en la ĉambron de la knabinoj.

Tie li renkontis John'on. Dum la lastaj tagoj la junulo ofte vizitis la knabinojn, restis duonhoron kaj pli longe tie supre, vivece rakontante ion al Anna. Ĉi tiun fojon Mateo suprenirante la ŝtuparon, ree aŭdis tie la voĉon de la junulo.

„Jen, rigardu!“ parolis John. „Jen kiel oni vivas ĉi tie en la nova mondo! Ĉu ne bone?“

Ekvidinte Mateon, John tuj adiaŭis kaj ekkuris por ne maltrafi sian vagonaron. Mateo restis. Lia vizaĝo estis iom pala, la okuloj malgajaj; Anna kun klinita kapo atendis, kion li diros. Ambaŭ knabinoj rigardis lin iom konfuzite, malgraŭvole rememorante la indianan frapon kaj timante, ke Lozinski eble komprenas iliajn pensojn. Li peze sidiĝis sur la liton kaj sin turnis al Anna:

„Ĉu vi deziras, orfino, aŭdi, kion diros al vi Mateo Lozinski?“

„Bonvolu paroli! Mi vin ŝatas kiel parencon,“ mallaŭte respondis la knabino, dezirante montri al Mateo, ke ŝi ne ĉesis lin respekti post la hieraŭa okazintajo.

Mateo daŭrigis kun doloro.

„Ne multe da bono estas en ĉi tiu lando, infano! Kredu al mi, ne multe da bono! Sodom kaj Gomora . . .“

Roza nevole ekridetis, sed Mateo parolis tiel malĝoje, ke en la okuloj de Anna aperis larmoj. Ŝi pensis, ke, laŭ rakonto de John, en Ameriko tute ne estas tiel malbone, se homo nur scias aranĝi siajn aferojn. Sed ŝi ne kontraŭparolis kaj diris mallaŭte:

„Kion do fari nun?“

„Kion fari? Se estus eble, mi metus mian sakon surdorsen, prenus mian bastonon kaj, kunpreninte vin, mi irus hejmen, en nian patrolandon, eble eĉ almozpetante dumvoje, en la nomo de Dio! Mi preferus almozpeti en mia patrolando aŭ fariĝi kondukanto de blinduloj aŭ eĉ morti ie sur ŝoseo en la patrolando . . . Sur ŝoseo aŭ sur kamparo . . . en la patrolando. Sed tio ne estas ebla, ĉar . . .“

Li frotis al si la frunton kaj daŭrigis:

„Ĉar tie kuŝas la maro . . . Leteron de Osip ni ne ricevos. Sed se ni restos tiel sidantaj kun krucitaj brakoj, ni nenion bonan ĝisatendos. Do jen kion mi volas diri al vi, orfino! Mi alkondukos vin al tiu sinjorino . . . nia sampatrujanino. Kaj rilate min, mi ankaŭ serĉos, kie estas bezonataj fortaj brakoj . . . Kaj se . . . se mi ĉi tie ne pereos, atendu min . . . Mi ĝis nun neniam mensogis en mia vivo kaj . . . se mi ne pereos, mi venos vin preni . . .“

(Daŭrigota.)

Prelegoj pri Esp. Literaturo en London.

Ĉe la Marylebone Commercial Institute (unu el la vesperaj lernejoj sub la administro de la Municipala Estraro de Londono) malfermiĝis kurso de prelegoj pri Esperanta Literaturo. Estas notinde, ke la prelegoj estas en Esperanto kaj formas parton de la oficiala kursaro ĉe la vespera lernejo. La parolanto estas s-o M. C. Butler, Lingva Komitatano kaj sekretario de la Brita Esperanto-Asocio. La unua prelego, kiu havis lokon la 24-an de majo, traktis pri Ĝeneralaj Konsideroj pri la Literaturo; ĉu Esperanto estas Literatura Lingvo; tropoj; stilo ktp. Kontraŭ la riproĉo, ke Esperanto estas lingvo sen tradicio, s-o Butler insistis, ke ne nur la vortoj, el kiuj konsistas nia lingvo, havas sian propran tradicion — la saman kiun ili havas en la lingvoj, en kiuj ili naskiĝis — sed ankaŭ nia lingvo mem havas sian propran spiriton kaj tradicion. Esperanto prezentas la forton de la angla, la filozofiecon de la germana, la precizecon de la franca, kun la belsoneco de la itala. En nia lingvo estas kvazaŭ du stiloj: la internacia kaj tiu stilo uzata por reprezenti kiel eble plej fidele la originalan naciolingvan verkon. Legante la Biblion en Esperanto, s-o Butler konstatis, ke, dum la lingvaĵo de la Malnova Testamento fluas nature kaj facil-kompreneble, estas tute kontraŭe ĉe la Nova Testamento. La kaŭzo, li diris, estas ke d-ro Zamenhof sciis paroli la lingvon, dum la tradukintoj de la Nova Testamento ne sciis ĝin paroli. Antaŭ ĉio, do, estas necese lerni paroli antaŭ ol skribi. *P. J. C. (London).*

Esperanto en francaj ĵurnaloj.

En numero de grava eksporta revuo „Les echos de l' exportation" dediĉita al la pariza foiro aperis artikolo de s-o Archdeacon „La komerco bezonas universalan lingvon" kun lia portreto.

En aprila numero de pacifista revuo „La paix par le droit" (Nîmes) estas favora kritiko pri la parolado de prof. Richet en „Cercle Commercial et Industriel de France" pri Esperanto. S-o Ch. Richet estas unu el la direktoroj de tiu ĉi revuo.

Esperanto en Marseille (Francio).

Esperantista Oficejo, 58 rue Consolat. Ĉiuj gesamideanoj, korespondantoj, komercistoj, petante servojn, informojn, sciigojn, sin turnu al f-ino Casale, konstanta oficistino de l' Esp. Oficejo.

Intersindikata Grupo Esperantista, Laborborso. Daŭrigo de l' elementa kaj supera kursoj ĉe la sidejo, ĉiulunde kaj ĉiuvendrede je 7 h. vespere.

Ĝenerala kunveno je 7 h. vespere, ĉiun 2-an kaj 4-an ĵaudon de l' monato.

Liberiga Stelo, Laborborso. Kunvenoj post la laboristaj kursoj.

Publika senpaga kurso, ĉiudimanĉe, je 10 h. matene, en publika lernejo, strato Frédéric Chevillon 30. Pagata kurso en „Komerca Instituto".

„Verda Aperitivo" ĉiudimanĉe je 11 h. matene. Ĉiuj fremdaj ges-anoj trapasantaj la urbon kore invitataj.

Esperanto en Tarrasa (Hisp.).

Kun mirinda sukceso finis kursojn 40 novaj adeptoj al nia idealo. Jus fondiĝis grupeto „Esperantista Junularo", infana fako de esp. grupo „Lumo". Post 4 monata lernado 20 geinfanoj de 9 ĝis 14 jaroj jam korespondas kun eksterlando. Komencis nova kurso por fraŭlinoj. — Kelkaj s-anoj intencas viziti la XIII-an en Praha.

Dank' al Esperanto pli ol 50 aŭstraj infanoj loĝas gastame akceptitaj en nia urbo. Lokaj ĵurnaloj ofte raportas pri Esperanto.

La infanoj volonte korespondus kun samaĝuloj. La adreso estas: Esperanta Junularo „Lumo", San Antoni 64, Tarrasa, Hispanujo.

Orienta Foiro en Budapest kaj Esperanto.

La Orientan Foiron en Budapest la 14-an de majo solene malfermis regnestro Horthy en la Industria Halo. Ankoraŭ neniam estis tiel multaj ekspozantoj, kaj jam la unuajn festtagojn laŭ sciigo 160 000 homoj vizitis la foiron. Je la unua fojo oni devis eĉ antaŭ la Halo sur la libera placo starigi tendojn de komercistoj. La esperantistoj havas malgrandan elmontrejon, kiu bone taŭgas, ke la popolamasoj vidu, ke Esperanto ekzistas en la praktika vivo. Dejoras posttagmeze s-ano Elek Tolnai, kiu plej multe laboris por aranĝi la ekspozicieton. S-oj Laquer kaj Balkanyi helpis al li.

Esperanto en Miskolc.

En Miskolc (nordorienta urbo de Hungario kun 61 000 loĝantoj) finiĝis kursoj kun 20 partoprenintoj sub gvidado de s-anoj M. Auer kaj J. Stuber. Nova komenciĝis en la turista societo „Edelweiss", kiun gvidas s-ano S. Spiro.

Esperanto en Banato.

En Timišoara (Temeszvar), Banato, Rumanio, s-o Alfred Baumbach, del. de UEA, malfermis la 4. majo kurson kun 30 lernantoj.

Ĝenerala Kunveno de la Societo „Konkordo".

(Raporto de nia kunlaboranto Ad. Oberrotman.)

La 18. majo okazis la ĝenerala kunveno de la societo „Konkordo" en la belaj salonoj de s-ino Zamenhof. Malfermis la kunvenon d-o Vilh. Robin klarigante celon kaj taskon de la societo, kaj raportante pri la lastaj triumfoj de Esperanto en aliaj landoj. Kiel prezidanto de la kunveno estis elektata d-o Leono Zamenhof, sekretariis f-ino d-o Muszkatblat, asesoroj inĝ. Tejchfeld kaj Adam Zakrzewski. S-o Lonkopolanski legis statuton de „Konkordo" oficiale akceptitan kaj legalizitan per la Ministerio por Internaj Aferoj. La statuto estis unuvoĉe akceptata. D-o Robin informis pri la financa stato de la societo; la lasta prelego kun prof. Richet donis puran enspezon de 1267 mk., kun la dume enkasigita mono 11 000 mk. Oni ankaŭ diskutis pri eldono de speciala organo sub titolo „Konkordo". Laŭ sciigo de d-o Zamenhof similaj societoj konkordanaj estas fonditaj en Francujo kaj Anglujo.

S-ano Rozanykwiat proponas kiel provizoran sidejon sian oficejon (str. Dluga 23, I), du belajn ĉambrojn kun 2 telefonoj. Tre ĝuste diris unu el la ĉeestantoj: Nia hodiaŭa kunveno estas historia, ĝi okazas en la laborĉambro de nia neforgesebla majstro. La tagordo pro la malfrua nokto ne estis ankoraŭ elĉerpita, estis ankoraŭ kelkaj gravaj aferoj, nome sendi memorskribajon al la registaro por nomi la straton, kie laboris nia majstro, „strato de Zamenhof", kaj por pendigi memortabulon sur la domo, kie li eldonis la lingvon. La ĝenerala kunveno elektis sekvantan estraron: prez. d-o Robin, sekr. f-ino d-o Muszkatblat, estraranoj d-o Krenicki, inĝ. Tejchfeld, del. UEA. Ad. Oberrotman, vicdel. J. Litauer kaj Lonkopolanski, anstataŭantoj s-oj Lotto kaj Pozner, reviz. d-o Dubrowicz, Rozanykwiat, Weinthal. Laŭ propono de d-o Robin la kunveno unuvoĉe kun multaj aplaŭdoj nomis ĉeestantan s-inon Klara Zamenhof honora membro de la societo.

Alvoko al kuracistoj!

Kolegoj! Venu grandnombre al la Dekiria kaj partoprenu nian kuracistan kunvenon!

Jen nia programo laŭ ĝis nun anoncitaj raportoj:

1. D-ro W. Robin el Warszawa: „Pri revivigo de TEKA".
2. D-ro K. Mezei el Budapesto: „Internacia medicina revuo."
3. Prof. Richet el Parizo: „Medicina terminologio."
4. D-ro Blasberg el Krakow: „Transformiĝado de ideoj kaj direktoi en la moderna kliniko."
5. D-ro K. Weiss el Stuttgart: „La kuracista organizado kaj la kontraŭmalsana asekuro en Germanujo."

Programo ankoraŭ povas esti ŝanĝota aŭ pligota!

Postkongresa ekskurso al la famekonataj nordbohemaj banlokoj „Franzensbad, Marienbad, Karlsbad kaj Joachimsthal".

Aliĝu kiel eble plej baldaŭ kaj anoncu vian aliĝon ankaŭ al mi private per poŝtkarto.

M. U. D-ro Adolf Bischitzky,
Praha,
Mikulašska 12.

Tra la Mondo.

En Bruselo fondiĝis belga komunista partio, kiu aliĝis al la tria internacionalo en Moskvo.

Per granda soleno oni starigis la monumenton de plej fama hungara verkisto Mauro Jokai sur la Jokai-placo en Budapest la 21-an de majo. Deputacioj kaj lernejaj studentaroj laŭvice iris al la monumento por surmeti siajn florojn. En la Nacia Teatro estis festprezentado.

La hungara ministro por internaj aferoj malpermesis la surstratan vendadon de plej disvastigita strata ĵurnalo „Az Est" pro artikolo pri memmortigo de kondamnitino.

Okaze de la ribeloj en Alexandria estas 78 personoj mortigitaj, inter ili tri italoj, franco kaj dekkvar grekoj.

La oficialaj nombroj de la enmigrontoj, kiuj en monato junio estos allasataj al Usono, estas sekvantaj: Britujo 5023, Norvegujo 950, Svedujo 1530, Danmarko 453, Holando 276, Belgujo 119, Francujo 437, Svisujo 287, Germanlando 5219, Finnlando 298, Afriko 909. Tiuj ĉi nombroj signifas 3% de la nombro de jam estantaj en Ameriko anoj de la nnuopaj ŝtatoj.

En Mergantown (Okcident-Virginio) falegis milita aviadilo el granda alteco. Kvin oficiroj kaj du civiluloj mortis.

Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldono de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo" estas permesata.)

LETERO EL ITALIO.

Bologna, 29. majo 1921.

Sendube oni devas agnoski kiel aprobindajn la vortoin de l' eldonista artikolo de ET 8. maja pri Politiko en Esp. Gazetaro. Tamen la politika fakto okazinta meze de tiu-ĉi monato en Italio estis tiel grava por si mem kaj tiel interesanta la tutan nacianaron, ke mi kredas, ke ĝi povos multe interesi ankaŭ eksterlande, kaj aliaflanke, ke oni povos raporti pri ĝi tiom senantaŭjuĝe kaj nur laŭrakonte, ke nenies politikaj ideoj povas bedaŭri ĝian raportadon. Tio estis la ĝeneralaj elektoj por nova deputitaro.

En mia lastmonata korespondaĵo mi priskribis la situacion, kiu konsilis al la registaro, eksigi la malnovan Parlamenton kaj kunvoki la voĉdonantaron.

La voĉdonado okazis preskaŭ ĉie plene regule. Ankaŭ la socialistoj, kies partopreno estis antaŭe diskutata en ĝia partia C-Direkcio (?), povis ĉie voĉdoni. La deputitaro, laŭ la rezultoj, multe ŝanĝis sian aspekton laŭnombre. Novaĵo estas la oficiala eniro de grupo da 25—30 deputitoj „faskistaj" kaj tiu de la reprezentantoj de l' nove aneksitaj landoj, inter kiuj videbliĝas oko da germanoj kaj slavoj.

La malnovaj partioj estas reprezentataj per 250 konstituciistoj, inter kiuj distingiĝas liberaloj, demokratoj, la grupo kontraŭ-Giolitti'a de Nitti, radikaloj k. c., 120 socialistoj unuiĝemaj, 14 komunistoj (antaŭe sume 156), 109 popular-katolikoj (antaŭe 99), deko da naciistoj (ŝovinistoj italaj), seso da respublikanoj, kvino da socialistoj serdependaj. Estas notinde, ke la faskistoj preskaŭ ĉie eniris per unuiĝo kun la konstituciistoj laŭ kanditataj listoj diritaj de „naciaj blokoj", dum socialistoj, komunistoj, katolikoj kaj respublikanoj ĉie luktis per propraj listoj.

La 8-an de junio Lia Reĝa Moŝto malfermos la serion de l' parlamentaj kunvenoj per kronparolado, kiu elmontros la gravan programon de laboroj, kiun la Ministraro Giolitti intencas submeti al la popol-elektitoj. Estas viva espero en ĉiuj, ke la verko de l' nova Parlamento povu unuflanke pacigi la animojn kaj aliaflanke vigle antaŭenpuŝi la progreson de l' demokrata reĝimo kaj la rekonstruadon de la moralaj kaj materialaj domaĝoj de l' milito.

Kaj — kiu vivos, vidos! diras itala proverbo.

Humberto Toschi.

Grafologio.

Respondoj.

Suprasileziano. — Nekomuna klereco; forta, hardita, tre aktiva intelekto riĉa je rekta logiko, fervoro, sindonemo, sincereco, ordemo, prizorgoj. Rapida decido, klaraj perspektivoj. Karaktero riĉa je simpatiaj kvalitoj; volo konstanta, kvankam nepersistema kontraŭ malsukcesoj.

Leono. — Ordema kaj studema intelekto, negranda fantazio, simpleco, eta sentemo, sintenemo, liberamo, emo je novaj ideoj, persista volo, nekonfidemo.

Pomo. — Nekonstanta, iam persista volo, bona fantazio, logiko, iaj literaturaj emoj, entuziasmiĝemo, revademo, sinkaŝemo, nefortaj skrupuloj, ia strangeco, vantemo. — Por la de vi esperata edziĝo felicon kaj kontentiĝon mi bondeziras al vi!

GRAFOS.

Opa Vendado de ET.

Novaj aĉetejoj (vidu ET n-ojn 32 kaj 34):

Estonio.

Haapsalu (Librejo Tamverk, librejo „Lääne", stacia librejo kaj fotografisto Grünthal).

Gazetaro.

L'HUMANITÉ. 20. majo.
Raportas pri la kongreso de revoluciemaj esperantistoj en Orléans.

A NOITE. 3. majo.
Granda ĵurnalo de Rio de Janeiro, enhavas ilustr. artikolo pri la 6-a Brazila Esp. Kongreso.

A PATRIA.
Grava tagĵurnalo de Rio de Janeiro, enhavas en sia n-o de 20. aprilo longan artikolon pri la inaŭguracio de la 6-a Kongreso Brazila de Esperanto, kun ilustrajo de la naskiĝa domo de d-o Zamenhof kaj kun portretoj de la majstro kaj de la organizintoj de l' kongreso. — La sama ĵurnalo raportas en n-o de 25. aprilo pri la ferma kunsido (kun ilustrajo).

Recenzejo.

GAZETOJ.

DER ARBEITER-ESPERANTIST. Junio.
Novaj laboristaj grupoj en Germanujo: Deuben, Döhlen, Essen, Köln-Deilbrück, Werden.

ESPERANTA FINNLANDO. Majo.
Ilustr. artikolo pri Helsinki, la perlo de finna golfo, kaj aliaj legindaĵoj.

HUNGARA ESPERANTISTO. Majo.
12-paĝa gazeto kun literaturo kaj kronika enhavo.

L' ESPERANTO. Marto.
Kun suplemento LA PATRIE LADINE, revuo por friul-, karn-, dolomit- kaj grizoniando. En ladina lingvo kaj en Esperanto. Eldonanto de tiu interesa revuo: A. Paolei, S. Vito al Tagliamento, Italio.

NOVA TEMPO. Majo.
Internacia revuo por kulturlaboro. Nur en Esperanto. Eldonejo: Wien, VI, Mollardgasse 55.

SAMIDEANO. Internacia Biblioteko. Majo.
Nova gazeto oktavformata, 20-paĝa kun kovrilo kaj aldono, eldonata de Oskar Ziegler & K-io en Markt-Redwitz, Bavario. Jarabono 30 mk.

BRESLAUER MESSE-ZEITUNG (Foirgazeto de Breslau).
Aprilo. En germana lingvo. Kun esp. artikolo: Bonvenon en Breslaŭ!

MESSE-ZEITUNG (Foirgazeto) Reichenberg.
Grava gazeto por komercistoj kaj industriistoj, kun ampleksa anonca parto.

Parolejo.

86.

Resumo de la redakcio pri la Formato de ET.

(Rilatas al 68.)

Ĉi-sube ni represas la opiniojn senditajn al ni en la lasta tempo pri la formato de ET.

Al malpligrandigo konsilas el la nove alsenditaj opinioj nur s-o J. M. en Graz, skribante: Mi konsentas al la paragrafo 1-a, ke la formato estu simila al tiu de „Esperanto" (Ĝenevo). La nuna formato estas iom tro granda kaj maloportuna, des pli, ĉar la esperantistoj kutime konservas la gazeton kaj bindigas ĝin. Por envolvi aĉetajojn, sufiĉas la tagĵurnaloj.

Ĉiuj aliaj opinias, ke la nuna formato estas aŭ konservota aŭ pligrandigota.

Mi kredas (skribas s-o P. J. Cameron en London), ke estas gravega eraro ŝanĝi la formaton, ĉar — kiel vi prave diras — la nuna formato liveras ĵurnalon similan en formo al tiu de la ĉiutagaj ĵurnaloj.

Alia brito, s-o Yelland, London, skribas: Ne malgrandigu aŭ ŝanĝu la formaton de ET. Mi ĉiam en vagonaroj kaj tramoj legas ĝin kiel ordinaran ĵurnalon, por ke la publiko rimarku, ke ekzistas „vera ĵurnalo“ (laŭ formo) en Esperanto.

S-o W. M. Page, Edinburgh, Skotlando, opinias, ke „ET en sia nuna formato estas tute oportuna por la leganto kaj precipe por la propagando; ĝi konservu apartan karakteron“.

Ni aŭdu la voĉon de franco, s-o P. Filliâtre en Paris: Mi kredas, ke via ĵurnalo ne devas ŝanĝi sian formon.

Kaj tiun de italo, s-o d-o Toschi en Bologna: Formato bonega estas la nuna. Mi eĉ ne grandigus ĝin, ĉar jam ĝi egalas tiun de grandnombro da germanaj, ĉehaj ktp. tagĵurnaloj.

Hispana s-ano, José Salazar en Bañacaldo, eĉ „malpermesas“ al la eldonanto malgrandigi la formaton. Li skribas jene: Eksciu, ke mi „malpermesas“ al vi la ŝanĝon, kiun s-o M. de V. proponas por via ĵurnalo; ĉar tiam mi perdus la fieron, kiun mi havas, kiam mi iras sur la stratoj legante kaj preskaŭ metante ĝin inter ambaŭ okuloj de neesperantistaj preterpasantoj.

Ni aŭdu kelkajn poloju. S-o Fr. Prengel en Bromberg-Bydgoszcz „neniam konsentus je plimalgrandigo de ET. La enhavo estas por ni esperantistoj, sed la ekstera aspekto de la ĵurnalo estas propagandilo kaj varbilo inter neesperantista publiko; ĝi do devas aspekti kiel vera taggazeto, ĉar ĝi — mi tion certe opinias — iam fariĝos tia“.

S-o Cz. Pruski en Siedlce konstatas „el propra sperto, ke la nuna formato de ET estas plej efika por propagando kaj tute oportuna por legado“.

S-o d-o Fousek en Prelouc, Ĉeĥoslovakio, skribas, ke „la preso kaj la formato ŝajnas al mi tute bonaj, taŭgaj, konvenaj. Ne ŝanĝu ilin!“

S-o Thiele en Elberfeld diras, ke li „ŝatas la nunan formaton kiel tre bonan kaj oportunan“.

S-o H. Sappl en Graz skribas: Kio koncernas la formaton de la ĵurnalo, mi opinias, ke la nuna formato estas plej bona. Mi tute ne ŝatus pli malgrandan formaton, ĉar ni jam havas en nia esp. gazetaro sufiĉe malgrandajn gazetetojn, per kiuj mi neniam povis atingi rimarkindan sukceson ĉe la popolo. Ni vere bezonis gazeton esperantan, kiu havas la saman aspekton kiel niaj taggazetoj. Se vi volas ankoraŭ pligrandigi la nunan formaton, mi ne volas rekomendi tion al vi el jenaj kaŭzoj. Vi estas tute prava, se vi diras el propagandaj celoj. Sed, se vi montras al la publiko grandegan gazeton kun 2 paĝoj aŭ eĉ kun 1 paĝo, oni ridas pri tio, precipe la kleraj personoj. Ili ofte scias, ke ni per tio volas propagandi, se ni presigas grandajn gazetojn. Diversfoje mi jam faris la sperton, ke sufiĉe granda parto ne tiel ŝatas la grandajn gazetojn. Mallonge, se vi restas ĉe la nuna formato, laŭ mia opinio estus plej bone.

(Rim. de Red.: La timo de s-o Sappl, ke ET estus nur 2- aŭ eĉ 1-paĝa, se la formato estus pligrandigata, estas senbaza. ET havos minimume 4 paĝojn, ankaŭ se la formato estos pligrandigata.)

Restas ankoraŭ la voĉoj, kiuj deziras pligrandigi la formaton.

F-ino Roksano en Béziers opinias, ke „ET devas simili al naciaj ĉiutagaj gazetoj; estus multe preferinde pligrandigi la formaton ol plimultigi la paĝojn“.

S-o St. Pedrazzini en Locarno skribas: Pri la formato de via ĵurnalo mi opinias, ke ĝi devas esti pligrandigata aŭ eliri kun 6 aŭ 8 paĝoj en la nuna formato.

Kiel lastan opinion ni represas tiun de s-o E. Fethke en Oppeln: Sub la rubriko Parolejo n-o 68, proponis iu samideano, ke la formato de ET fariĝu simila al tiu de „Esperanto“ de UEA. Laŭ mia opinio — se oni jam volas ŝanĝi la formaton de ET — oni devus ĝin ankoraŭ pligrandigi. ET propagandas por Esperanto multe per sia gazeta karaktero, do ankaŭ formato. La homoj vidas, ke Esperantujo posedas ne nur revuojn monatajn, sed ke ĝi jam estas tiel forta, ke aperas en ĝi eĉ gazeto. ET estas la nuna sola gazeto en Esperantujo. Ĉiuj nacilingvaj gazetoj aperas en granda formato (en t. n. „gazeiformato“), kial do nia esp. gazeto ne aperu en tia formato? La formato de ET eĉ ankoraŭ ne estas tiel granda, kiel tiu de la plej grava nacia gazeto, tial ĝi pligrandiĝu kaj ne male.

* * *

El la ĉi-supre represitaj opinioj oni vidas, ke la granda plimulto ne konsentas al la deziro de s-o M. de V. pri malgrandigo de la formato. La eldonanto mem ĉiam akcentis la ĵurnalan karakteron de ET, kaj li nun ĝojas, ke la plimulto de la legantoj samopinias kun li. Lia decido do estas, provizore lasi la formaton, sed estonte — kiam tio estos ebla — pligrandigi ĝin por doni al la ĵurnalo aspekton de vera taggazeto. Cetere pri la pligrandigo aŭ ne de la formato kundecidigas ne sole teoriaj sed ankaŭ teknikaj konsideroj. Ekzemple estas multe pli praktike por la presado, la ekspedado kaj ankaŭ por la leganto, se la ĵurnalo konsistos el unu sola folio de 4 grandaj paĝoj ol se ĝi konsistos el unu pligranda (kun 4 malgrandaj paĝoj) kaj unu plimalgranda folio (kun 2 malgrandaj paĝoj).

La opinioĵn pri la aliaj punktoj de „parolo 68“ (literoj kaj mallongigoj) ni represos en iu venonta numero.

Internacia organizacio de fabrikantoj kaj komercantoj

Agrikulturaĵn Maŝinojn

estas fondata! La interesuloj kunvenos dum la XIII-a Kongreso.

Informojn donas

Fr. Barth,

ĉe firmo „Agraria“ en Bratislava, Ĉeĥoslovakio.

ALBUMO

pri la Enterigo de nia Majstro

en arta aranĝo, laŭ originalaj fotografaĵoj, aperos en la eldonejo de ET je la kongreso de Praha.

Prezo ĉ. 1,50 sv. fk.

Ĉiu esperantisto devas posedi tiun memoraĵon.

Antaŭmendoj estas jam nun akceptataj.

ARGENTINIO.

Reprezentadon de ĉiuspecaj komercaĵoj, facile vendeblaj en Sudameriko, nur de kapablaj firmoj unuaklasaj, akceptas eksoficisto teknika de la Argentinia Terkultura Ministerio. Konatiĝis bonege dum 7 jaroj kun la tieaj ekonomiaj cirkonstancoj. Post kelkmonata restado ĉi tie reveturos Argentinion, trapasonte okcident- kaj nordokcident-eŭropajn landojn. Absolutaj moralaj-materiaj garantioj. Adreso ĝis la XIII-a: L. Kelety, Szászsebes (Sebesul Sasesc), Transsilvanio, Rumanio; poste: Kelety-Martelli, c. Caseros 528, Buenos-Aires, Argentinio.

Interesega Libro!

Aĉetu ĉe **N. Jäger, Pisa** (Italio), Via Vitt. Em. 17, la faman novegan libron

La Historio de Kristo

(La Storia di Cristo)

de l' mondkonata verkisto **G. Papini,** kies apero tiom impresis la tutmondajn kulturrondojn.

Prezo it. lir. 25.— aŭ sv. fk. 7.— aŭ samvaloron en naciaj monbiletoj.

Al UEA-anoj kaj al aĉetantoj de almenaŭ 5 ekz. rabaton de 10 %.

Okaze de la Kongreso en Essen

aperis bela fotografaĵo; ĝi estas mendebla pere de s-o Fritz Pillath, Essen, Ortrudstr. 48.

Prezo de granda foto 10 mk., de poŝtkarta foto 2 mk.

Anoncetoj.

(Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj kostas por dufoja enpreso la samon kiel kvin numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpreso kostas la duoblon.)

LAŬDO. Kamarado Maurin el Marseille tre dankas la helpemon de gefratoj Tiard el Parizo, pro gentilega servo ricevita de ili en Parizo, post reveno de l' kongreso en Orléans.

WORMERVEER (Nederlando). Nia esp. societo „Kunigita per Esperanto“ festos la 18. junio sian 6-jaran ekziston en la domo de ges-oj Woud. Tagordo: malfermo, laŭtlegado de l' raporto pri la antaŭa jarfesto, legado de gratuloj kaj telegramoj, priparolado de estontaj kursoj kaj propagandaj kunvenoj, komuna kantado kaj manĝado ktp.; fermo je la 2-a aŭ 3-a horo post meznokto. — La prezidentino: T. Woud v. Exter; la sekretario: G. Woud, Noordeinde 95, Wormerveer.

DOMETOJN (ingojn) de vivantaj surlandaj kaj endolĉakvaj MOLUSKOJ (limakoj kaj konkoj) el ĉiuj landoj deziras ricevi (interŝanĝe je iuj ajn deziataj objektoj aŭ esperantajoj) zoologiisto d-ro R. Wohlstadt, 22, Lübeckerthor, Hamburg (Germ.), Mineralogia-Geologia Instituto.

Korespondo kaj interŝanĝo.

(Dufoja enpreso kostas la samon kiel tri numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpreso kostas la duoblon.)

Izaak Śpiro, Bialystok, Pol., Poŝtkesto 61, deziras korespondi kun gelernantoj, ankaŭ vendi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, papermonojn kaj monbiletojn.

S-o Jozsef Krehnyay, polica inspektoro en Diosgyör-Vasgyar (Hungario), deziras korespondi kun ĉiulandanoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj.

S-o Robert Winklhöfer, Plauen i. V., Germ., Chamissostr. 22, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj kartojn ilustritajn.

Lwow (Polio), str. Sw. Zofii 44, s-o Fr. Zachariasiewicz, liveras 100 malsamajn poŝtmarkojn polajn por sendo de 5 svis. fk., 200 poŝtm. pol. por sendo de 25 sv. fk.; aŭstrajn kaj germanajn kun subskribo Poczta Polska, plebiscit, ruĝa kruco ktp., ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn laŭ katalogo de Michel 1920.

H. Haenen, administristo de l' minlernejo, Heerlen (Hol.), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun supersilezianoj, rusoj, poluj anoj, ĉeĥoslovakianoj, finnoj kaj eksterŭropanoj.

Kiu deziras aĉeti malkare poŝtmarkojn de „Fiume“, Jugoslavio, Litovio kaj Polio, aŭ interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonon, bonvolu skribi al s-ro L. Galinski, Sobieskiego 5, Bialystok, Polio.

Kiu bezonas bonajn polajn poŝtmarko- kaj papermonokolektojn, tiu povas interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonon kun mi. Mi korespondas ankaŭ pri matematiko kaj naturscienco. — Lazaro Grosberg, Bialystok (Pol.), ul. Jurowiecka 5.

Jiri Frankenberger, del. UEA, Bytčica u Ziliny, Slovakio, interŝanĝas poŝtkartojn kaj leterojn kun turistoj de la tuta mondo.

S-ro J. Oulehla, adm. oficisto en Skrivany apud Novy Bydzov (Bohemio) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun Rusio, Ukrainio, Polio, Estonio, Litovio, Letonio, Danio, Islando, ĉiujn germanajn plebiscitajn, Württemberg, de ordinaraj ĝis pli altaj valoroj, po 1 ĝis 10 de ĉiu speco laŭ katalogo Michel 1920.

Prof. Sauerborn, Köln, Siebengebirgs-Allee 52, deziras interŝanĝi stampitajn kaj nestampitajn poŝtmarkojn kontraŭ samnombraj germanaj poŝtmarkoj kun samideanoj en ĉiuj landoj.

S-o Max Butin, Godesberg a. Rhein (Germ.), Kronprinzenstr. 55, interŝanĝas poŝtmarkojn kun eksterlandanoj. Mi donas ankaŭ helpmonbiletojn aŭ ilustr. poŝtkartojn kontraŭ poŝtmarkoj; ĉiam respondos.

S-o Weber Herbert, Breslaŭ, Hummerei 25, I., Germ., deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Korespondadon per poŝtkartoj ilustr. aŭ leteroj kun gesamideanoj el ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj, deziras s-ro Ludwig Goppel, Horrem, Bez. Köln (Germ.), Ludendorffstr. 55. Certe respondos.

Korespondadon per poŝtkartoj ilustr. aŭ leteroj kun gesamideanoj el ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj, deziras s-ro Michael Wieland, Horrem, Bez. Köln (Germ.), Waldweg 21. Certe respondos.

Esperanta-Pola Eldonejo

NOWE TORY

(LA NOVAJ VOJOJ)

fondita de prof. L. Kronenberg en Bydgoszcz, Polio.

(Telegramoj: Tory, Bydgoszcz).

Vendas kaj interŝanĝas

poŝtkartojn el ĉiuj plej vidindaj urboj de Polujo (ĉefurbo Warszawa, fama preĝejo Czenstochowa, salminejo Wieliczka, Krakovo, Leopolo, Lodzo, montaro Karpatoj ktp.),

poŝtmarkojn eksterlandajn kaj polajn, tre maloftajn,

papermonon eksterlandan kaj polan,

antikvan monon nikelan, arĝentan.

Detalajojn por respondkupono.

Ne sendas unua.

Volas aĉeti

pli grandan kvanton da prespapero.

Peras

presadon de broŝuroj en polaj presejoj, malkostaj pro la mona kurzo.

Donas komercajn informojn.

Serĉas interrilatojn kun presejoj, eldonejoj kaj paperejoj.

Aranĝas reklamon en pola gazetaro.

Plena profito por propagando de Esperanto en Polujo.

Razaparatoj

por poŝo, el latuno arĝentumita, en bela nikelumita ujo, tegita per veluro.

M&C N

Bruligiloj.

Lasta novaĵo: Bruligilo „Patent-krajono“ n-ro 116, uzebla kiel bruligilo same kiel krajono. Objekto por ĉiutaga uzado. — Seriozaj aĉetontoj mendu nian prezaron. Ni serĉas reprezentantojn.

Muscat & Christlein, Nürnberg, Germ.

Angla kaj Esperanta Etimologio

(Angle kaj Esperante).

Verkita de Charles G. Stuart-Menteth.

(Oksforda diplomo kun distingo.)

„Utila lernilo por atentigi la anglan publikon pri multaj Esp radikoj en ilia lingvo.“

Holanda Pioniro.

„Interesegaj tabeloj.“ *Kristana Espero.*

Vidu citojn p. 57 de nova Jar-libro B. E. A.

Prezo 10 pencoj (= 4 respond-kuponoj) afrankite.

B. E. A., 17, Hart Street, London W C 1.

Esperanto-Verlag Berlin S 59

Friedrich Ellersiek ••• Wissmann-Str. 46

(Germanujo).

Esperanto-eldonejo kaj libro-eksportejo

liveras ĉiujn haveblajn librojn el Germanujo, eldonas Esperantajn verkojn kaj la gazeton

„Esperanto-Praktiko“

ĉiumonata organo por perfektigo en Esperanto.

Esperanto-Katalogo senpage, specimena numero de la gazeto kontraŭ 1 respondkupono aŭ 1 Mk. germ.

Specialaj katalogoj pri germanaj libroj laŭ deziro.